


La Espero

2005:2

Produkttema Esperanto-verkisto Produktiv esperanto-författare



Tre produktema estas nia sveda Esperanto-verkisto Sten Johansson. Sur paĝo 2 vi povos legi intervuon kun li. Sur p. 3 vi trovos liston de liaj verkoj kaj tradukoj kaj sur p. 7 vi legos lian recenzon de klasika Esperanto-verko.

Ĉi-apude vi povas vidu unu lian originalaĵon "Kion ajn, facila rakonto" kaj unu tradukaĵon "La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson".

Vå svenske esperantoförfattare Sten Johansson är mycket produktiv. På sidan 2 kan ni läsa en intervju med honom. På s. 3 hittar ni en lista på hans verk och översättningar och på s. 7 kan ni läsa en recension av honom om ett klassiskt verk på esperanto.

Här bredvid kan ni se ett av hans verk i original "Vad som helst, en lätt berättelse" (skriven på lätt esperanto, för nybörjare) och översättningen "Nils holgerssons underbara resa".

Litovio - signifa por Esperanto Litauen - betydelsefullt för esperanto

Litovio estas signifa lando por Esperanto kaj por la esperantistoj. La prauloj de la kreinto de Esperanto L.L. Zamenhof loĝis en la lando, kvankam Zamenhof mem elkreskis en tio, kio nun estas Pollando. Litovio estas ankaŭ la lando, kiu havas la plej grandan proporcio da Esperanto-parolantoj kompare al la loĝantaroj. Ĉi-jare la 90:a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Litovio. Maldekstre: la kongresejo. Dekstre: Esperanto-kurso en Litovio.

Litauen är ett betydelsefullt land för esperanto och esperantisterna. Esperantos skapares L.L. Zamenhofs släkt hade sina rötter i landet, även om Zamenhof själv växte upp i det som nu är Polen. Litauen är också det land som har det största antalet esperantotalante i förhållande till befolkningen. I år hålls den 90:e universella esperanto-kongressen i Litauen. Till vänster: kongressbyggnaden. Till höger: esperantokurs i Litauen.



Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
 Marto 2005 • 93-a jarkolekto
 Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:
 Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: esperanto@glocalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2005: 200 kr.
 Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
 avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
 Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
 tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
 dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2005:
 Direktansluten medlem 200 kr.
 Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-
 der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-
 rantisters Ungdomsförbund.
 Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
 Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
 Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande:


Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm
Järnvägsgränd 11
961 76 Boden
tel. 0921-123 54
e-post: nordenstorm@glocalnet.net
 När kommer *La Espero* 2005?

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har bråd-
 skande information som måste komma ut senast ett visst
 datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Sten
 Johansson



Kie vi naskiĝis?
 En Kalmar.

Kie vi loĝas?
 En Norrköping.

Pri kio vi laboras?
 En urba administrejo, pri statistiko,
 prognozoj, analizado pri publikaj
 servoj.

*Kiujn interesojn vi havas krom Espe-
 ranto?*

Literaturo, homaj kondutoj, naturo,
 ekskursoj piede, bicikle, skie, skete
 ktp.

Ĉu vi havas familion?
 Filon dudekjaran.

De kiam vi interesigas pri Esperanto?
 Mi lernis ĝin kiel deksesjarulo, uzis
 ĝin dum kelkaj jaroj, kabeis, post jar-
 deko malkabeis kaj de du jardekoj de-
 nove uzas ĝin. Por mi Esperanto estas
 vivanta lingvo, komunikilo de ordina-
 raj homoj (se tiaj ekzistas), ne ludilo
 de lingvemuloj, nek mondo-sava pro-
 pono kiun trudi al la potenculoj.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la
 Esperanto-movado?*

Nun ne. Mi ne ŝatas la movadon, ĉar
 ĝi estas tro sektisma kaj flegas mitojn
 kaj stultajn ideojn. Ekzemple la ideon,
 ke ĉia komunikado en Esperanto es-
 tas bona, dum ĉia komunikado en la
 angla estas malbona. Sed kiel junulo
 mi estis redaktoro de *Kvinpinto*, kiu
 tiam estis organo de SEJU.

Ĉu ekzistas aliaj interesajoj pri vi?
 Verŝajne ne. Mi estas malinteresa ulo.

Tial mi inventas homojn, situaciojn,
 rakontojn, kiuj espereble estas pli in-
 teresaj kaj distraj (vidu la liston pri
 originalaj verkoj). Mi ankaŭ ŝatas peri
 verkojn, kiuj plaĉas al mi, al aliaj ho-
 moj, ekzemple per tradukado de sve-
 da literaturo, kaj per recenzado de
 Esperantaj libroj. Traduki litera-
 turajon signifas rilati kun ĝi tre inti-
 me. Tio plaĉas al mi. Krome mi kole-
 ktas informojn kaj recenzojn pri ori-
 ginala Esperanta literaturo kaj
 aŭtoroj ĉe
esperanto.net/literaturo/. Laŭ mi, la
 nivelo de nia literaturo ne estas alta.
 Tamen estas jam mirinde, ke ĝi entu-
 te ekzistas, ĉar Esperanto estas tre
 malgranda lingvo, plejparte ne here-
 data sed lernata kiel fremda lingvo,
 uzata hodie de kelkaj miloj da homoj
 dum eta parto de iliaj liberaj horoj. Mi
 ne volas troigi ĝian signifon, sed
 simple uzi ĝin kaj utiligi ĝiajn eblojn.
 Laŭ mi, valora uzado de Esperanto
 eblas en diversaj kampoj – por
 vojaĝoj kaj amikaj rilatoj, en familio,
 en literaturo, muziko kaj sendube
 multaj aliaj.

Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

Listo pri verkoj, vidu p. 3.

Estimataj samideanoj!

Estas tempo por nova *La Espero*. Mi dankas al ĉiuj, kiuj sendis al mi novaĵojn
 kaj aliajn kontribuojn por la revuo.
 Hieraŭ estis malvarma tago en la komenco de Marto. Estis preskaŭ -30°C. Kiel
 bone ke ni uzas la Celciusajn gradojn por mezuri varmon kaj malvarmon.
 Nun preskaŭ ĉiuj landoj uzas ĝin. Imagu ke la homaro estus same saĝa
 kiam temas pri lingvoj. Do, ni ĉiuj uzus Esperanton por internaciaj kontak-
 toj. Mi ege amas Esperanton. En mia urbo Boden mi renkontis kelkajn ho-
 mojn, kiuj interesigas pri Esperanto, sed ankaŭ homojn, kiuj interesigas pri
 la loka dialekto. Mi rimarkas la saman ĝojon inter la Esperanto-parolan-
 toj kaj inter la dialektparolantoj. Se homoj komprenas unu la alian ni ha-
 vas rajton ĝoĝi!

Via redaktoro



KORESPONDU

SEJU ricevis leteron el Guantanamo, Kubo. Evis deziras havi junajn korespondamikojn en Svedio. Li laboras kun komputiloj en entrepreno kaj interesigas pri diversaj temoj en la vivo. Evis studas esperanton en la unua nivelo kaj deziras korespondi! Se vi volas korespondi kun Evis, skribu al seju@esperanto.se kaj ni donos lian adreson al vi!

SEJU:s årsmöte 2005

Helgen den 11-12 juni 2005 håller SEJU sitt årsmöte på den idylliska ön Lyr strax norr om Göteborg. Vi kommer att välja styrelse för det kommande verksamhetsåret, men framför allt umgås och ha trevligt på esperanto och svenska. Årsmötet och boende är gratis, men vi vill att du anmäler dig senast den 30 april till seju@esperanto.se. Du får då vägbeskrivning och annan viktig information. Förslag till stadgeändringar samt motioner ställs till samma adress senast den 30 april. På årsmötets program står bland annat diskussioner om det kommande IJK i Polen. Kom till Lyr!

NEKROLOGO

Gun Gerdman

En marto 2005 forpasis Gun Gerdman post longa malsano. Ŝi naskiĝis en 1916, kaj jam en lernejo en la urbo Västerås konatiĝis kun kelkaj el la amikoj, kiuj poste formis junularan Esperanto-grupon en Stokholmo.

La grupo ekskursis kaj somerumis kune dum la 40-aj kaj 50-aj jaroj. En la Esperanto-movado Gun trovis sian edzon Birger, kiu forpasis en la 60-aj jaroj. Ilia filino Kerstin komencis lerni Esperanton jam kiel infano.

Dum longa tempo Gun estis la motoro, prezidanto kaj kursgvidanto de la Esperanto-Klubo de Stokholmo. Certe preskaŭ ĉiuj el la nun aktivaj membroj de la klubo iam iris en kurso, kiun Gun gvidis.

La partoprenantoj de la universala kongreso de Stockholm 1980 povis tranokti malmultekoste danke al ŝia serĉado de junulargastejoj kaj tranoktejoj.

La Esperanto-Klubo de Stokholmo jam antaŭ pluraj jaroj montris sian aprezon pri la laboro de Gun Gerdman per tio, ke ŝi estis ĝia honora membro.

Ulla Luin

Universitetskurs på distans

Höstterminen 2005 håller Umeå Universitet en nybörjarkurs i esperanto på distans. Kursen heter "Esperanto, introduktionskurs 1, 5 poäng" och går på fjärdedelsfart (dvs 5 högskolepoäng på en termin). Kursens målbeskrivning lyder: "den studerande ska förvärva förmåga att förstå enklare texter i esperanto, delta i samtal om vardagliga ämnen samt, i enkel form, meddela och berätta något såväl muntligt som skriftligt inom välbekanta områden." Alltså en jättebra kurs för dig som vill skaffa dig en bra grund i esperanto. Behörigheten består i s.k. grundläggande behörighet, vilket betyder att alla med ett fullständigt betyg från gymnasiet är behöriga att söka kursen. Mer information hittar ni på Umeå Universitets hemsida: www.uu.se. Ansökan ska vara inne **senast den 15 april!**

Anmäl dig till IJK

Det är ännu inte för sent att anmäla sig till IJK i Polen mellan den 31 juli och den 7 augusti 2005. Mer infor-

mation om IJK på svenska kan ni hitta på SEJU:s hemsida: www.tejo.org/seju/. Där finns även en länk till den officiella hemsidan för IJK.

KEF en Helsinki

Inter la 16:an kaj 23:an de julio 2005 okazos KEF (Kultura Esperanto Festivalo) en Helsinki, Finnlando. Inter alie estos koncertoj kun Dolchamar kaj Esperanto Desperado, Vi ankaŭ povos sperti sperti esperantan karaokeon kaj aŭskulti esperantan erotikan poezion! Pliaj informoj: www.esperanto.fi/kef2005

Även till SEF:s årsmöte

SEJU kommer även finnas representerat under SEF:s årsmöte i Haninge den 21-22 maj 2005. Är ni nyfikna om SEJU:s verksamhet och har frågor eller bra (eller dåliga) ideer, så går det bra att framföra dessa under SEF:s årsmöte.

Verkoj de Sten Johansson

Verkoj originalaj:

Denaska kongresano (novelaro 1992)
Ĝis revido, krokodilido! (novelaro 1996)
Interkona mateno (teatraĵoj 1996)
Mistero ĉe Nigra Lago (romaneto por infanoj 1997)
Falĉita kiel fojno (krimromano 1997)
Trans maro kaj morto (krimromano 1999)
Neĝo kaŝas nur... (krimromano 2001)
La krimo de Katrina (facil-lega rakonto 2001)
Dis! (romano 2001)
Kion ajn (facil-lega rakonto 2002)
Vojaĝo kun Katrina (facil-lega rakonto 2002)
Memor' mortiga (krimromano 2003)
Katrina malfruas (facil-lega rakonto 2004)
Pasteĉo (stilpasticĉoj, aperos en 2005)
Noveloj aperis en "Tempo fuĝas" (1995), "Sferoj 10" (2000), "Fervoja katastrofo" (2000) kaj "Mondoĵ" (2001).

Verkoj tradukitaj:

Hjalmar Söderberg: La kiso kaj 13 aliaj noveloj (1995)
Pär Lagerkvist, Eyvind Johnson, Harry Martinson: Nobela novelaro (1995)
Torgny Lindgren: La beleco de Merab (novelaro 1995)
En la realo troviĝas truo. Nuntempa sveda novelarto (1996)
Torgny Lindgren: La vojo de serpento sur roko (romano 1997)
Benjamin Jacobsen: Inter tero kaj ĉielo.
Kvin gajaj memoroj (facil-legaj noveloj 1997)
Carl Jonas Love Almqvist: Tio konvenas! (romaneto 1998)
Hjalmar Söderberg: Doktoro Glas (romano 1998)
Hjalmar Söderberg: La pelto kaj 14 aliaj noveloj (1999)
August Strindberg: Songodramo (dramo 1999)
Selma Lagerlöf: La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson (2002)
August Strindberg: Insulanoj de Hemsö (romano, aperos en 2005)

Ĉina atmosfero en Sunda Esperanto-Agado plivigliĝas

Skövde Esperantoklubb, kiu nun havas 27 membrojn, reelektis dum sia jarkunveno la prezidanton Karl-Gustaf Gustafsson kaj ankaŭ sian tutan ceteran estraron.

La pasintan jaron havis multe da ĉina aspekto dank' al tio ke Karl-Gustaf Gustafsson kaj Birgitta Anevik faris vizitojn ĉe esperantistoj kaj aliaj medioj en Ĉinujo, faris filmojn pri tio kaj poste povis en la klubo prezenti plurajn rezultojn de la vizito. Estis fakte "respondvizito", al vizitp, kiun unu jaron pli frue faris ĉina esperantisto, Huang Zhengsu, en Skövde.

La klubo nun melte laboras por eluzi interreton por Esperanto. Inter alia estas distanc-kurso kun 12 lecionoj.

Krom monataj kunvenoj kun variaj programoj la klubo havis lingvo-kaj literaturkursen en la propra klubejo. Tie estas ankaŭ sufiĉe riĉa biblioteko, bone aranĝita kaj novigita de Hilgon Frisk.

La klubmembroj Carl-Erik Olsson kaj Solveig Bertilsson prizorgis presadon de La Espero kaj lernolibroj.

Börje Andersson

Svedo redaktas Dian Regnon

La dumonata kristana revuo en Esperanto, Dia Regno, eldonata de Kristana Esperantista Ligo Internacia, havas novan redaktoron: Bengt Olof Åradsson en Nynäshamn. La eksredaktoro Philippe Cousson, fariĝis prezidanto de KELI.

La unua numero de Dia Regno por 2005 enhavas i.a. mesaĝon de la prezidanto, informojn pri la 17- Ekumena Kongreso en Piliscsaba en Hungario, artikolojn pri kristana tempokalkulado, ekumenismo kaj pri kristanaj trajtoj en la libroj de J.R.R. Tolkien. La nova redaktoro prezentas sin mem kaj klarigas kelkajn terminojn pri interreto. Dia Regno raportas pri kristnaska celebrado en Esperanto k.t.p. Dum la lastaj jaroj plimultiĝis artikoloj kaj predioj de afrikaj kristanaj esperantistoj. Tia aperas ankaŭ en tiu ĉi numero. Fine aperas traduko de sveda himno.

La retpaĝo de KELI troviĝas ĉe: www.chez.com/keli

La esperantistoj ĉe Sundo (Öresund) jam la kvaran jaron havas komunan gazeton: Ponto. Nun aldoniĝis komuna retpaĝo ĉe www.agado.net

El la programo de Klubo Esperantista de Malmö ni povas mencii ke Annelie Nilsson raportis pri siaj spertoj de laboro por la abc-organizo de Hindio, kie ŝi laboris pri trejnado de infanoj kaj virinoj. Per-Olov Johansson raportis pri 17-taga vojaĝo en Sudafriko. Sub la rubriko "Viva gazeto" Gertrud rakontis pri Lars Dufwa, Gulli pri vivo en Malmö dum sia infaneco. Kjell raportis pri artikolo pri Zamenhof en libro de Boris Kolker, Per-Olof pri la filmo pri Vittula, Gern aranĝis konkurson kaj Åke rakontis historion pri policiestro.

El Lund kaj Helsingborgo

En Ponto ni povas legi raportojn ankaŭ el Helsingborgo kaj Lund.

En Helsingborgo la klubo havas merkredan studgrupon, kaj volas aranĝi ankaŭ komencantulan kurson. Ĝi planas ankaŭ ekskurson al Sofiero.

En Lund la klubo aranĝis festenon kun kristnaska manĝaĵo. Ulla Saether legis rakonton en sia infanaĝo, same Ulla Ström. Ebba kaj My el Osby flutis kaj pianludis, John Ideland akompanis komunan kantadon. Okazis ankaŭ aŭkcio.

Ni povas konkludi ke la Sundaj kluboj organizas agrablajn kaj variajn programojn.

Stokholma agado diversflanka

La revuo de Esperantoklubo de Stokholmo, EKSpreso, havas tutan redakcian komitaton: Mikael Blind, Ingvar Enhardt, Edith Köhler, Kristoffer Larsson kaj Soile Lingman..

La klubo organizas kunvenojn ĉiusemajne. 19-20 marto okazas semajnfina kurso. Dum marto kaj aprilo EsperantoCentro estos malfermita ĉiun merkredon 16-18.

Krom Esperantoklubo de Stokhol-

mo, ekzistas ankaŭ Laborista klubo, Esperanto i Väsby kaj Esperantoförningen Södertörn.

Renovigita retpaĝo de Eldona

La retpaĝo de Eldona Societo Esperanto/Esperantoförbundet nun estas renovigita. Se vi volas legi pri la libroj eldonitaj de Eldona, kaj eventuale mendi librojn serĉu ĉe:

www.algonet.se/~eldona aŭ pli simple per www.esperanto.se

Gimnazio de Lerum

Ĉe gimnazio de Lerum jam kvin jarojn estas studata Esperanto. Ĉar la Internacia Lingvo ja bonege taŭgas por lernejoj interŝanĝoj kun aliaj landoj, ni efektive havis tiajn dum tiuj ĉi jaroj. La unuan jaron ni korespondis kun Esperanto-klaso en Petrópolis en Brazilo, la duan jaron ni veturis al la granda Euroscola-en-Esperanto en Strasburgo. Plue ankaŭ Esperantolernanoj ĉe antikva privatliceo en Glostro (Gloucester) en Anglio korespondadis kun ni.

Ĉi-jare ni havas interŝanĝon kun Litovio, nome kun Mezlernejo de Jonas Totoraitis en Marijampolé, urbo sude de Kaunas. Tioo, kio igas tiun ĉi kunlaboron ekksterordinara estas ke Societo Nordio kune kun la telekonzerno Telia-Sonera pagas por ĝi. Ŝajne oni vola fortigi la ligilojn inter la nordiaj kaj la baltiaj landoj, precipe kun Litovio, al kiu ja mankas komuna kun ni historio.

Komence de majo miaj Esperantostudentoj kaj mi veturos al Lotovio por renkonti klasanojn de "Jonas Totoraitis", kun kiuj ili jam plurajn monatojn estos laborintaj pri la projekto "Nia bildo de via lando". Post ni ĉiuj svedoj kaj litovoj - reveturos al Svedio por kune sperti nian landon.

Se vi volas legi pri niaj planoj kaj sekvi nian projekton, vizitu la ttt-ejon.nordkontakt.com, poste serĉu la rubrikon "Esperanto" en la tiel nomata Galerio.

Folke Wedlin
Laŭ Inter-Ligilo

Bazaj faktoj pri Litovio - La lando de la ĉi jara Universala Kongreso de Esperanto



Loĝantaro

En la lando loĝas ĉirkaŭ 3 500 000 homoj, en Vilno - 542 000. Litovoj konsistigas 83,5%, poloj 6,7%, rusoj 6,3%. Litovio okupas areon de 65 300 kv. km., en kvadrata kilometro loĝas 53,4 homoj. Du trionoj de loĝantoj estas urbanoj, unu triono - vilaĝanoj. Averaĝa vivodaŭro de viroj estas 65, de virinoj - 77 jaroj. Virinoj konsistigas 53,2%, kaj viroj - 46,8%.

Klimato

La klimato estas inter la kontinenta kaj mara. En julio la meza temperaturo de aero estas +17 gradoj laŭ Celsio, humido 78%. Iam pluvas. Altklasaj hoteloj, restoracioj kaj vendejoj estas bone klimatizitaj.

Lingvoj

Litova lingvo estas la sola ŝtata lingvo. Ĝi estas la plej arkaika vivanta hindeŭropa lingvo, uzanta adaptitan latinan alfabeton el 32 literoj. En Vilno vi facile interkomunikiĝos ruse, iam eĉ pole. Kun junaj homoj vi povos interparoli angle.

Areo de la ŝtato:

65 200 kvadrataj kilometroj. En Eŭropo estas 15 malpli grandaj ŝtatoj: Albanio, Belgio, Bosnio-Hercegovino, Danio, Estonio, Kroatio, Latvio, Luksemburgio, Makedonio, Malto, Moldavio, Nederlando, Slovakio, Slovenio, Svislando.

Landlimoj

norde kun Latvio 588 km, oriente kaj sude kun Belorusio 660 km, sude kun Pollando 103 km, sudokcidente kun Rusio 273 km, okcidente 90 km da Baltmara bordo. Entute 1714 km.

Mono

Lido (Lt aŭ LTL) estas la sola legala mono. 1 lido egalas al 100 cendoj.

1, 2, 5 lidoj estas moneroj, 10, 20, 50, 100, 200 kaj 500 lidoj estas monbiletoj.

Estas ebleco ŝanĝi vian valuton (eŭrojn, dolarojn kaj t.p.) en bankoj

kaj bankomatoj. Kurzo ĉie varias, sed ne tre. Kurzo de eŭro ĉiam estas konstanta: 1 eŭro = 3,45 Lt; kurzo de Usona dolaro ofte ŝanĝiĝas: 1 USD = ĉ. 2,70 Lt

Multaj hoteloj, restoracioj, vendejoj akceptas kreditkartojn (VISA, Eurocard, American Express).

Loka tempo

Litovio estas en centra Eŭropa tempozono: UTC + 2 horoj (somere +3 horoj).

Trikakvo

Bonkvalita akvo kompare kun trinkakvo en aliaj landoj de EU. Vi povas aĉeti gasakvon aŭ mineralan akvon en vendejoj, sed tio ne estas nepra. Vendejoj laboras proksimume de la 8a horo matene ĝis la 22a horo.

Elektro

La elektra tensio estas 220-volta. La kontaktiloj estas dupolusaj.

Transporto

La ĉefa publika transporto en multaj urboj estas busoj, treolebusoj, minibusoj kaj taksioj.

Bus/trolebus-biletoj por unu veturo kostas 80 cendojn, ili estas vendataj en gazetaj kioskoj. Se vi aĉetos bileton en buso/trolebuso, vi devos pagi 1 lidon. Eblas aĉeti specialajn biletojn por unu, tri aŭ dek tagoj. Estas ebleco lui aŭtomobilon.

Medikamentoj

Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton en la latina.

Sanservoj

Eksterlandanoj havu konfirmilon pri sanasekuro. Por eniri Litovion ne estas necesa vakcinado. LKK kaj UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

Gravaj telefonnumeroj

Polico, fajrobrigado kaj urĝa medicina helpo 112, informoj pri enlandaj

telefon-numeroj 118 (en Vilno).

Telefonado

El eksterlando al Vilno: +370-5-(7-cifera numero). El aliaj litovaj urboj al Vilno: 8-5-(7-cifera numero). Por voki eksterlandon el Litovio vi devas scii kodon de lando.

Eblas telefoni el ĉiuj telefonbudoj rekte al eksterlando. La telefonbudoj uzas telefonkartojn aĉeteblajn en poŝtoŝtancoj kaj diversaj butikoj, gazetaj kioskoj.

Sekureco

Vilno estas ĝenerale tute sekura urbo, tamen estu atentemaj pri dokumentoj, mono, poŝtelefonoj k.s.

Memoraĵoj

La plej bonaj memoraĵoj el Litovio estas faritaĵoj el sukceso, teksaĵoj el lino, diversaj argilaĵoj kaj lignaj eltranĉaĵoj.

Tereno

Apudmara ebenaĵo, nur en orienta parto aperas montetoj; la plej alta monteto - Juozapin_ (293,6 m super marnivelo).

Ŝtata ordo

Demokratia respubliko. La valida konstitucio aprobita dum referendumo la 25an de oktobro 1992. Gvidanto de la ŝtato - prezidento, ĵlektata rekte de civitanoj por 5 jaroj. Parlamento estas nomata Sejmo, ĝin konsistigas 141 membroj elektataj por 4 jaroj.

Ŝtataj flago, blazono kaj himno


Ŝtata flago - trikoloro flava-verdaruĝa, aprobita en 1918.

Ŝtata blazono: kavaliro sur blanka rajdĉevalo en ruĝa fono, ekde 14 jarcento. La blazono nomiĝas "Vytyis" (La Persekutanto).

Ŝtata himno: "Nacia glorkanto" verkita de Vincas Kudirka, unuan fondon kantita en 1906.

Petras Ĉeliauskas kaj aliaj

Kun permeso de Litova Esperanto-Asocio



Vikipedio plej furoras en la esperanta reto

La plej populara esperantlingva retejo dum la jaro 2004 kredeble estis Vikipedio, kun proksimume 3 000 vizitoj ĉiutage. Populara estis ankaŭ ĝangalo, kies servilo kolapsis tuj post la fino de la jaro pro tro da vizitoj. Ie meze troviĝas la ĉefa retejo de UEA kun 760 vizitoj tage. Malpli popularaj estas la retejoj de SAT kun 22 vizitoj tage kaj de la Esperanta Civito kun mezume 11 vizitoj ĉiutage dum la lastaj du jaroj.

Laŭ libera folio

Litova prezidento protektas

La Prezidento de la Litova Respubliko s-ro Valdas Adamkus akceptis la inviton esti Alta Protektanto de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Vilno de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2005. La litova ŝtatestro esprimis sian varman sintenon al la UK jam en septembro 2001, kiam ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller vizitis Litovion por esplori la kondiĉojn por la okazigo de UK. Tiam s-ro Adamkus akceptis en la prezidenta palaco Buller kaj la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas kaj parlamentanton Stasys Kruzinaskas. Dum la aŭdienco li menciis, ke li unuafoje interesiĝis kaj eĉ iom lernetis Esperanton kiel gimnaziano en Kaunas.

Valdas Adamkus naskiĝis la 3-an de novembro 1926 en Kaunas. Post la dua mondmilito li vivis komence en Germanio kaj ekde 1949 en Usono, kie li diplomiĝis kiel civila inĝeniero kaj okupis gravajn postenojn en la Usona Mediprotekta Agentejo EPA. Li estis ankaŭ kunordiganto de la usona helpo al la baltaj ŝtatoj pri mediprotektado, en kiu funkcio li povis ekde 1972 ĉiujare viziti sian naskiĝlandon. Li estis renoma aktivulo en la ekzila litova komunumo, precipe en ĝia kultura kaj sporta vivo. Ankoraŭ vivante en Usono li komencis partopreni en la socia kaj politika vivo de Litovio post la restarigo de ĝia sendependeco en 1990. Reveninte al sia patrolando li en 1998 unuafoje elektis prezidento de la respubliko por kvinjara

mandato. Por la dua fojo li ekokupis la oficon de la Ŝtatestro en 2004.

Pro siaj meritoj por mediprotektado s-ro Adamkus ricevis internacian mediprotektan premion en 1988 kaj oran medalon de la Usona Mediprotekta Agentejo. En 2003 li fariĝis Ambasadoro de Bona Volo de Unesko por la konstruado de la informsocio.

UEA atentigas UN pri lingvaj rajtoj

Pro siaj konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, UEA havas la rajton liveri al UN-organoj skribajn dokumentojn, kiuj rilatas al tagordaj punktoj de iliaj kunvenoj. Uzante tiun eblecon prezidanto Renato Corsetti sendis dokumenton al la Komisiono de UN pri Homaj Rajtoj por distribuo inter la membroj de ĝia 61-a sesio, kiu kunvenos en ĝenevo de la 14-a de marto ĝis la 22-a de aprilo. La dokumento rilatas al la tagorda punkto, kiu pritraktos la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn.

UEA atentigas la Komisionon, ke laŭ la dua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en la Deklaracio apartenas al ĉiuj homoj sen diferencigo i.a. laŭ lingvo, sed malgraŭ tio UN kaj ĝiaj membroŝtatoj donis al la lingva aspekto de la homaj rajtoj malmulte da atento ĝis nun.

La dokumento de UEA elstarigas la negativajn sekvojn de la edukado de infanoj en alia lingvo ol la gepatra. Laŭ multaj esploroj uzo de netaŭga lingvo en lernejo estas unu el la plej gravaj kaŭzoj, aŭ eĉ la plej grava kaŭzo, de antaŭtempa forlaso de lernejo, kiu siavice kondukas al seriozaj sociaj problemoj, ĉar ĝi pligrandigas la riskon je senlaboreco, krimado, alkoholisimo kaj drog-uzado. Laŭ studo de UN mem, la plej malriĉaj landoj povus ŝpari grandegajn sumojn, se la lingvaj homaj rajtoj de iliaj loĝantoj estus respektataj per la uzado de lokaj lingvoj en instruado.

Pli ĝenerale UEA komentas ankaŭ la uzon de nur kelkaj difinitaj lingvoj por kontakto inter homoj de malsamaj popoloj kiel malkontentigan kaj diskriminacian praktikon kaj kiel kontraŭdiran al la dua artikolo de la Universala Deklaracio. UEA proponas, ke la Komisiono starigu laborgrupon por pristudi la problemojn de lingvaj homaj rajtoj kaj la malobservon de homaj rajtoj pro lingvaj malegaleco kaj maljusteco. En sia raporto la laborgrupo devus proponi mez- kaj longperspektivajn agojn por certigi lingvaj homajn rajtojn en diversaj lingvaj kaj kulturaj situacioj. La Komisiono devus ankaŭ apogi la klopodojn de fakuloj, interalie de UEA, esplori

kaj eksperimenti la plej efikajn manierojn elekti la lingvojn uzotajn en lerneja instruado, kun la celo respekti lingvaj homajn rajtojn kaj kuraĝigi la evoluon en la koncernaj landoj. UEA ankaŭ renovigas sian malnovan proponon, ke la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN metu la temon "Lingvaj kaj Homaj Rajtoj" en la tagordon de unu el siaj estontaj kunvenoj.

Koresponda servo mondiskala

210 esperantistoj petis korespondantojn ĉe Koresponda Servo Mondskala en la jaro 2004. Jam tri jarojn la nombro de petantoj restas sur sama nivelo (220 en 2002, 230 en 2003), dum en 2001 ĝi estis 385. Kreskanta uzo de retumado jam de pluraj jaroj reduktis la nombron de petantoj. Pli grava kialo de la subita falo post 2001 verŝajne tamen estas nesufiĉa diskonigo de la servoj de KSM fare de Esperanto-gazetoj kaj kursgvidantoj, pro kio UEA instigas ilin al pli da aktiveco ĉi-rilate.


Inter la pasintjaraj petantoj estis 32 retuzantoj. Nur tri petantoj volis korespondi nur rete. Same kiel en antaŭaj jaroj, plej multe da petantoj estis el Francio (59) kaj la duan lokon okupis Brazilo (42). El Kubo kaj Pollando al KSM sin turnis po 12 petantoj. La plej rimarkindaj faloj kompare kun 2003 estis en Rusio (el 35 al 6) kaj la afrikaj landoj (el 53 al 30). Entute KSM ricevis petojn el 37 landoj. Jam de 1990 la korespondan servon de UEA prizorgas s-ro Francois Xavier Gilbert. La adreso de KSM estas: B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio. Informilon kaj aliĝilon oni povas peti kontraŭ unu respondkupono. Por rekte ricevi adresojn de korespondemuloj, oni sendu du respondkuponojn kun detalaj indikoj pri si mem kaj pri la dezirataj korespondantoj.

La retadreso de KSM estas kmesperanto@aol.com kaj de ĝia TTT-ejo: www.multimania.com/kosomo. En la TTT-ejo troviĝas ankaŭ aliĝilo, kiun oni povas surpaperigi kaj sendi al KSM.

Nova esperanta organizo – Por Sporto

Dum la 89a UK, Pekino okazis faka kunveno por fondo de Monda Esperanta Ligo Por Sporto (MELS). La ĉefaj celoj de MELS estas disvastigo de Esperanto inter la praktikantoj kaj ŝatantoj de sportoj kaj batalartoj kaj popularigo de sportoj kaj batalartoj pere de Esperanto.

Baniĝi en riveroj



La Espero ankoraŭfoje publikigas recenzon de ne tute nova libro, fakte de esperanta klasikajo: Raymond Schwartz: Kiel akvo de l' rivero. Romano, 487 p. Régulo, La Laguna 1962. Dansk Esperanto-Forlag 1977. Iltis 1987. Edistudio 1991.

Raymond Schwartz estis unu el la plej konataj verkistoj Esperantaj. La plej multaj esperantistoj sendube konas lin pro liaj spritaj vortludoj. Li estis kabaredisto, verkanto de amuzaj kaj fojfoje maldecetaj poemoj kaj noveloj. Sed Schwartz estis ankaŭ romanisto. En 1962 aperis lia ampleksa verko *Kiel akvo de l' rivero*, romano sur kies preskaŭ 500 paĝoj li disvolvis la vivon de Pierre Touchard, franco kun la radikoj en Loreno, limregiono inter Francio kaj Germanio, kie ankaŭ Schwartz naskiĝis.

Jam komence de la verko oni tute nature montras al ni la german-francan landlimon, kaj iom poste ĝi denove aperas en sceno tre simbola:

"Mi babilas, babiladas kaj forgesis atentigi vin, ke jam ni renkontis la landlimon. Jen, de kelka tempo ĝi sekvas nin, ĉi tie, dekstre de la ŝoseo. [...]"

"Tre interese", konstatis Pierre, "mi ne sciis... kaj tamen, se oni pripensas, ja ne povas esti alie inter landoj, kiujn disigas nek rivero, nek kruta montovando. Mi komprenas, ke ne estas eble, per iu kalko desegni linion kiel sur sportterenoj". Dum li tiel parolis, li flankeniĝis kaj jen staris unu momen-

ton kun kruroj larĝe disetenditaj, unu piedon ĉiuflanke de l' ĉevoja fosajo, kvazaŭ rajde super la landlimo.

"Mi agas kiel idioto", li ridetis, "sed jukis min la deziro havi samtempe unu piedon en Francujo kaj la alian sur germana grundo. Verdire, mi sentas nenian specialan sensacion. Kaj pro tia lino la homoj batalas..." (p. 77-78)

Efektive la libro temas pri tio, ke Pierre klopodas stari diskurre inter la du najbaraj sed malamikaj landoj. La rakonto komenciĝas en 1913 kaj finiĝas en 1946 (kun epilogeto pli malfrua), kaj ĝi okazas plejparte en du lokoj: en la kamparo sude de Metz en Loreno, kaj en Berlino. Krome, pli mallongaj partoj okazas en Parizo kaj Marsejlo.

La plej sukcesa parto de la romano estas la komenca restado en Loreno. Tie ni partoprenas en vilaĝa edziĝfesto kaj krome en ekskurseto trans la landlimon, el kiu estas ĉerpita la supra citaĵo. Jen oni rimarkas, ke Schwartz estis en sia hejma medio. Lia humuro aldonas tre plaĉan spicon al bona kaj suka sceno el iama vilaĝa vivo. Sen ajna urĝo li iom post iom, lerte kaj preskaŭ nerimarkate, kondukas la rakontofadenon antaŭen. Preskaŭ la samo direblas pri la sekva ĉapitro en Parizo, kie ni partoprenas en adiaŭa festeno de abiturientoj. Kaj post tio ni akompanas la protagoniston en Germanion.

Ankaŭ la rakonto el Berlino estas plejparte bona kaj interesa, tamen oni tie rimarkas, ke kvankam la aŭtoro ja konis la medion, tamen ĝi ne estis vere lia propra. Krome, ankaŭ ĉi tie ni devas kuniri al festenoj, kaj nun oni jam komencas iom ŝtopiĝi de tio. Des pli ĉar la Berlina etoso ĉe Schwartz ŝajnas pli multe influita de studentaj kaj militistaj ceremonioj ol de la klasike berlinana "kora krudeco". En Loreno ni spertis tre plaĉan, milde ironian sed bonvolan humuron. Sed ĉi tie en Berlino Schwartz farĉas la rakonton per sterilaj vortludoj, kio post nelonge iĝas terure teda, kvankam li prezentas ilin kiel la jargonon de iuj rolantoj en la rakonto. Tamen, kiel kontrasto al la kampara vivo en Loreno, ĉi ampleksa parto - pli ol triono de la libro - bone funkcias. En ĝia fino enplektiĝas ankaŭ du novaj temoj - la militkomenco en 1914 kaj amafero de Pierre, kiu iĝas decida por lia plua vivo - kaj io tia estas bezonata por konservi la koncentriĝon. Post Berlino sekvas ekscita ĉapitro okazanta dum la unua mondmilito, denove en Loreno. En tiu fazo la aŭtoro trovas rimedon lerte enŝovi kiel moton la titolon de la verko, esprimatan de la onklo de Pierre:

"Ni estas kaptitoj de nia ĉirkaŭaĵo, ne nur korpe, sed ankaŭ, kaj ĉefe, mense. Kiel akvo de l' rivero. Ĉiu guto en la Rodano fluas alsude, ĉiu guto en la Rejno alnorde. Kiel malproksimaj, malsimilaj unuj de la aliaj estas la akvoj de

tiuj riveroj ĉe iliaj enfluejoj en la maron! Kaj tamen kiel proksimaj, kiel parencaj, kiel samaj en siaj naskiĝlokoj." (p. 341)

Jen ne nur titolo, sed efektive ĉeftemo de la verko, kiu obstine ripetiĝas ekde komenco ĝis fino, kiel muzika gvidmotivo: Eĉ se oni vole-nevole devas sekvi unu riveron, tamen indas koni kaj ŝati ankaŭ aliajn, eĉ baniĝi en ili.

Poste ni saltas trans dudek kvin jarojn ĝis la komenco de nova milito. Tiu drasta salto tamen kaŭzas al la aŭtoro iom da problemoj por konstrui kredindan intrigon, sed ankaŭ tion li mastras pli-malpli kontentige, ĝisplue.


Nun ni jam eniris en la lastan kvaronon de la verko, kaj ĉi tie bedaŭrinde komenciĝas ĝiaj gravaj mankoj. Temas pri la problemoj kiel kunnodi ĉiujn fadenojn. Schwartz tre domaĝe faras tion per serio da ekstreme malprobablaj koincidoj. La afero ekas per tio, ke en la dua mondmilito, kiam la armeoj de Hitler konkeris Francion, la franca oficiro Pierre Touchard estas kaptita de la germanoj. Kaj la respondeca germana oficiro montriĝas esti lia plej bona amiko el la Berlina epoko, la reĝo de kontraŭknaĵoj, kiu tuj liberigas sian francan amikon. Nu, bone, unu tian koincidon la leganto ja povus toleri, kvankam tiel facilanima konduto de germana oficiro almenaŭ estas iom surpriza. Bedaŭrinde, la fabelo nur komenciĝis. Sekvas dua, tria, kvara, kvina koincidoj, pli kaj pli malprobablaj, pli kaj pli oftaj. La lasta kaj plej draste stulta okazas nur tri paĝojn antaŭ la librofino. Oni vere sentas, ke Schwartz post ege ambicia kaj lerta laboro jam plene malesperis pri kiel fini ĝin, kaj fatale decidis fini ĝin tuj, je ĉiu ajn kosto. En la unua duono de la verko li havis senfinan paciencon kaj fidon, ke iom post iom disvolviĝos la trankvila sinsekvo de aferoj. Sed ju pli alproksimiĝas la fino, des pli elĉerpiĝas lia pacienco kaj prudento, kaj kun ĝi ankaŭ la kredindeco de la intrigo. Domaĝe! Vere domaĝe! Tiel belega laboro, tiel valora verko, efektive unika en la originala literaturo Esperanta, ja meritus pli akcepteblan, realisman, malstultan finon!

Malgraŭ tiu bedaŭrinda fino, la verko *Kiel akvo de l' rivero* restas grava, interesa kaj legebla kun granda ĝuo. Ĝi havas tiom da bonaj ecoj, belajn, detalriĉajn kaj buntajn priskribojn kaj scenojn el malsamaj medioj, ankaŭ ĉarman etoson el la epoko antaŭmondmilita. Ĝia temo devus esti plej grava al ĉiu esperantisto. Kaj ĝia lingvaĵo estas tutsimple modela.

Legu ĝin!

Sten Johansson

Fantaziaĵo



John Francis: La Kastelo de Vitro. Romano. Kun ilustraĵoj de Francisco L. Veuthey. 197 p. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 2004.

Stela kaj Ernesto en malnova muelejo trovas pordon, kiu kondukas ilin al alia mondo. Al tiu mondo ili iras kelkfoje kaj partoprenas diversajn aventurojn. En la unua ili renkontas kavaliĝon kaj paĝion. Stela estas kaptita, kaj denove liberigita, kaj pro tio evitas teruran drakon. Feliĉe ili povas reveni al la vera mondo.

Ili tamen revenas al la alia mondo, kaj tie renkontas grandajn kuniklojn, maran serpenton, fokojn kaj Spiriton de la Tero.

Mi ne dirus ke la rakonto estas romano, sed fantaziaĵo. En aliaj lingvoj ĝi estus infanlibro, sed kiam temas pri Esperanto, nur malmultaj infanoj vere legas dikajn librojn en Esperanto. (Infanaj esperantistoj ofte preferas paroli Esperanton, sed ofte legas en naciaj lingvoj. Ĉu ne?) Do, certe pli multaj plenkreskuloj ol infanoj legos tiun ĉi fantazian libron. La vortoprovizo de la libro estas riĉa, kio ankaŭ certe malkuraĝigos al infanoj legi la libron.

Oni povus ankaŭ priskribi ĝin kiel kolekton de diversaj fabeloj, kiuj estas ordigiaj per kadra rakonto. La vigla rakontado kaj lerte faritaj desegnaĵoj donas al la leganto bonan impreson. Kiam mi komencis legi la libron mi ne volis ĉesi.

Leif Nordenstorm

Baldaŭ jarkongreso en Haninge 21-22 majo

Profesoro Hartmut Traummüller parolos pri la lingvistiko ĉe la universitato de Stokholmo, kiu inter alie aranĝis daŭrigan kurson pri Esperanto dum tiu ĉi lernoĵaro. Tio okazos en la posttagmezo de la sabato, dum la jarkongreso en Haninge 21-22 majo.

Bunta programo

Estos ankaŭ aro da interesaj kunvenoj dum la jarkongreso. Sveda Esperanto-Federacio SEF diskutos pri ŝanĝo de sia statuto, kio kaŭzis debaton en La Espero. Ankaŭ en la kunveno de Eldona Societo Esperanto estos demando pri ŝanĝo de statuto. Instruistoj kunvenos, kaj same la kristana sekcio.

Podia diskuto pri la vojo al centjariĝo okazos en la dimanĉa antaŭtagmezo, pro tio ke SEF estos 100-jara venontjare, same kiel unu el la ĉefaj kluboj.

Folkets Hus

La ejo de la jarkongreso, Folkets Hus en Haninge, konsistas el kafejo kaj lokaloj en la sama domo kiel la elirejo de la loka trajno, kun la ĉefa haltejo de aŭtobusoj de Haninge trans la strato, kaj parkejoj proksime. La jarkongreso okazos kunlabore kun la loka ABF.

Antaŭ la jarkongreso

En la vendredo antaŭ la jarkongreso, la 20 majo, estos malferma domo en Esperanto-Centro en Stokholmo posttagmeze kaj vespere. Ĝin aranĝos la esperanto-klubo de Upplands Väsby, kiu multe laboris dum la tuta lasta jaro por refreŝigi kaj rearanĝi la ejon.

Post la jarkongreso

En Haninge troviĝas la konata naturparko de Tyresta, kun endoma naturmuzeo. Post la fino de la jarkongreso eblos veturi tien per ordinara aŭtobuso, por mallonga promeno aŭ vizito al la muzeo.

Pri Haninge

Haninge estas unu el la modernaj antaŭurboj sude de Stokholmo, je distanco de 25-minuta veturo per loka trajno en la direkto Västerhaninge kaj Nynäshamn. Ĝi havas butikcentrojn, industriojn, malsanulejon, branĉon de la teknika altlernejo kaj modernajn loĝdomojn. Krome ĝi havas unu el la grandaj naturparkoj

de la regiono.

Aliĝo

Oni aliĝas per poŝtgiro 82 26 64-9, Esperantoföreningen Södertörn. Aliĝkotizo kaj manĝoj estas nur 645 kronoj (SEJU-membroj pagas cent kronojn malpli). Oni devas mem aranĝi tranoktejon, sed la loka esperanto-societo povas helpi pri proponoj pri hoteloj (en Stokholmo).

Loka societo

La loka aranĝo estas farata de Esperantoföreningen Södertörn. Ĝi konsistas el la malnovaj Esperanto-klubo de Haninge kaj Tyresö, kiuj kuniĝis al komuna klubo en la pasinta jaro. Prezidanto estas Roland Lindblom, 08-7774175, kasisto Ulla Luin, 08-7128291.

Ulla Luin

Program för SEF:s årskongress, Haninge, 21-22 maj 2005

Fredag 20 maj: Öppet hus eftermiddagskväll på Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, T-bana St Eriksplan, pendeltåg Karlberg.

Lördag 21 maj: Folkets Hus, Haninge
9.00 Välkommen; registrering av deltagare
10.00 Lärarförbundets möte
11.00 Esperantoförbundets möte
12.00 Lunch
13.00 Årskongressen öppnas
14.00 Esperantoförbundets årsmöte
16.30 Prof. Hartmut Traummüller "Lingvistiko ĉe la universitato de Stokholmo"
18.30 Middag
20.00 Lättare kvällsprogram

Söndag 22 maj, Folkets Hus, Haninge
9.30 Välkommen
10.00 Kristliga sektionens möte
11.00 Estraddiskussion "Survoje al centjariĝo de SEF"
12.30 Lunch
13.30 Avslutning

Söndag 22 maj: efter årskongressens slut
14.00 Besök i Tyresta nationalpark (buss 834 kl 14.24)

Kaffe-tider mm: mer information vid mötet. Ingången till Folkets Hus kommer att vara stängd under de viktigaste mötestiderna.